der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang Nr. 89 (3/1978) 30 Pf

AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

En 1975, Monda Packonsilantaro (MPK) publikigis novan „Stokholm-alvokon", kies tekston ni sendis al 115 naciaj kaj internaciaj esperantistaj organizoj kaj gazetoj kun nia propra komento. Tiu alvoko vekis grandan eĥon tra la tuta mondo kaj jam ricevis pli ol 400 milionojn da subskriboj. Tamen ŝajnas ke granda plimulto de la esperantistaj asocioj kaj gazetoj ĝenerale ignoris ĝin.

Ni perfekte komprenas ke ĉiu esperantista asocio havas siajn proprajn celojn kaj problemojn. Krome, multaj volas nepre observi la principon de politika neŭtraleco por ne ĝeni poresperantan agadon en ĉiuj medioj. Ankaŭ certe ne mankas samideanoj, kiuj vidas en la pacbatalo kaj en MPK ian komunistan kaptilon, aŭ simple opinias ke tiaj iniciatoj ne povas haltigi la vetarmadon, aŭ kutimiĝis al la nuna vivo, sub minaco de nova katastrofo, kvazaŭ tie estas neevitebla.

Al tiuj objetoj ni povas koncize respondi:

1. Se neŭtraleco pri partipolitikaj aferoj estas en iuj kondiĉoj komprenebla, neŭtraleco pri paco kaj milito signifas neŭtralecon pri vivo kaj morto. Ĉu tio estas imagebla, des pli kiam oni deklaras sin heredanto de D-ro Zamenhof, arda apostolo de la paco? Ĉu tia abdiko pri nia respondeco estas inda je homa estaĵo?

2. Nova mondmilito estus katastrofa por la tuta mondo kaj milfoje pli ruiniga ol ĉiuj antaŭaj konfliktoj. Paca kunvivado inter landoj kun malsamaj reĝimoj estas do absolute necesa, kio postulas haltigon de la vetarmado. La romkatolika religio kondamnas ĝin. Tio certe ne estas rezulto de „komunista" intrigo, sed de serioza analizo de la situacio kaj ties eblaj konsekvencoj. Kial la esperantista movado ne farus similan analizon?

3. La vetarmado ĉiam kondukis en la pasinto al milito. Silenti signifas akcepti. Kaj akcepti tiun politikon signifas permesi militon, frue-malfrue, kiu detruos nin aŭ niajn idojn. Ni turnas nin al via konscienco: ĉu vi pretas surporti tiun teruran respondecon?

4. Ni ne postulas, ke vi konsentu pri ĉiuj analizoj kaj pozicioj de Monda Packonsilantaro kaj de MEM. Ni simple proponas al la tuta esperantistaro, ke ĝi postulu ĉesigon de la vetarmado, ĝeneralan simultanan kaj kontrolatan malarmadon kaj pacan kunvivadon fare de ĉiuj registaroj senescepte. Ĉu eblas fari pli saĝan kaj pli realisman proponon kaj kiu povas malkonsenti?

Memore al la forpasinta amiko Rudi Graetz, iniciatinto de tiu ĉi artikolo, ĝin dedicas **S. N. Podkaminer**

Oktobra Revolucio kaj Rusia Esperantista Movado

La 60-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio en Rusio estis festata ne nur de la sovetiaj kaj socialistlandaj popoloj, sed de la tuta progresema homaro. La revolucio fariĝis turnopunkto de la monda historio: fondiĝis la unua en la mondo socialisma ŝtato, kiu malfermis novan epokon, la epokon de likvido de la privata posedaĵo je produktiloj kaj fino de ekspluatado de homo far' de homo. La revolucio naskis fortan reeĥon ĉe ĉiuj subpremitaj nacioj, klasoj kaj rasoj, trovintaj en ĝi bazon por ilia liberiga lukto. Ĝi fariĝis standardo por ĉiuj, kiuj batalis por paco, kontraŭ imperialismo kaj ĝia rabista politiko.

La revolucio alportis grandajn ŝanĝojn en ĉiuj vivosferoj de la popoloj, loĝintaj sur la teritorio de la estinta cara rusia imperio.

Gravaj ŝanĝoj okazis en la rusia esperantista movado. Rusio estis la unua lando, en kiu antaŭ 90 jaroj aperis lernolibro de Esperanto. Zamenhof kaj lia familio loĝis sur la teritorio de Pollando, kiu tiutempe estis parto de la rusia imperio kaj la rusa lingvo estis gepatra por Ludoviko kaj liaj gefratoj. La pli ol modestaj monrimedoj de Zamenhof ne permesis al li eldoni samtempe pli ol unu lernolibron kaj estas nature, ke tiu-ĉi unua lernolibro estis la ruslingva.

Tial estas kompreneble, ke la unuaj taĉmentoj de esperantistoj aperis en la estinta cara Rusio kaj konsistis plejparte el rusoj kaj poloj.

Neniu registaro povas militi sen la konsento de sia popolo. Ni vivas en epoko kiam la popoloj povas trudi sian volon, kaj ĉio dependas de ilia agado. La esperantistoj vivas sur nia terglobo kaj estas koncernataj kiel ĉiuj aliaj homoj!

5. Nun, prezidento J. Carter (Karter) volas konstrui novajn terurajn armilojn, notinde la abomenan, satanan neŭtronbombon, kiu detruus ĉian vivon kaj ne difektus la konstruaĵojn, uzinojn kaj materialojn. Li tiel endanĝerigas la vivon de la tuta homaro, relancas la vetarmadon, kaj neniu preteksto povas pravigi tiun akcelon de la kurado al morto.

Ni solene petas la tutan esperantistaron tuj agadi, kune kun ĉiuj pacamantoj en la tuta mondo, por ĉesigi tian frenezaĵon kaj postuli politikon de malarmado kaj paca kunvivado. La nuna situacio estas tro grava kaj tro danĝera por plue silenti!

Praktikaj konsiloj:

Ni konsilas al vi kunlabori kun aliaj pacorganizoj, kaj notinde kun la t. n. „pacmovado".

Vi povas turni vin al Monda Packonsilantaro, Lönnrotink, 25 A., 6. krs. Helsinki 18 (Finnlando) aŭ al nia movado (MEM): W. Gilbert, ĝenerala sekretario, 30 rue Croix Montoire, 37100 Tours (Francio).

Sekretariato de MEM

La apero de la lernolibro trovis fortan kvankam ne vastan, reeĥon ĉe la rusia progresema inteligentularo (studentoj, kuracistoj, instruistoj k. s.), kiuj admire akceptis ne nur Esperanton, sed ankaŭ la humanecajn ideojn de Zamenhof, lige kun la lingvo. La relative grandan disvastiĝon de Esperanto atestas la fakto, ke el mil ekzempleroj de la unua Esperanto-revuo, „La Esperantisto", 600 estis abonitaj en Rusio. Kiam pro aperigo en la revuo en 1895 de la artikolo de Leo Tolstoj „Kredo kaj prudento", la cara registaro malpermesis alvenon de la revuo Rusion, tiu-ĉi fakto starigis la ekzistopovon de la revuo kaj, certagrade, la movadon mem sur la randon de katastrofo.

Entute, tiutempa esperantista movado en Rusio havis demokratecan karakteron kaj iom post iom evoluis, malgraŭ diversaj obstakloj kaj bremsoj far' de la cara registaro.

Alian karakteron havis la esperantista movado en la ĉefurbo Sankt-Petersburgo (poste Petrogrado). Ties esperantista organizaĵo fondita en 1891, societo „Espero", ludinta gvidrolon en la landa movado, estis estrata plejparte de homoj, apartenintaj al la privilegiaj tavoloj de la tiama socio: nobeloj, komercistoj, caraj oficiroj, altrangaj oficistoj, profesoroj. La disvastigo de Esperanto inter laborulaj amasoj staris ekster iliaj atento kaj interesoj. Ili konsideris laboristojn kaj kamparanojn ne sufiĉe kleraj kaj kulturaj por ke ili povu percepti la altajn ideojn de la esperantismo. Lige kun tio gravas noti diametre kontraŭan pozicion, kiun okupis Zamenhof rilate la rolon, kiun ludos laboristoj en la esperantista movado. En 1910 en Germanio aperis unua en la mondo laborista Esperanto-revuo „Der Arbeiter Esperantist". En la salutletero, sendita de Zamenhof al la redakcio estis skribite:

„Verŝajne por neniu en la mondo nia demokrateca lingvo havas tiun gravecon kiel por laboristoj kaj mi esperas, ke pli malpli frue ili fariĝos la plej forta subteno al nia afero. La laboristoj ne nur komprenos utilon de Esperanto, sed ankaŭ ili pli ol iuj aliaj sentos la esencon kaj ideojn de l'esperantismo." (Leteroj de Zamenhof, volumo II, Letero n-ro 447)

La unua kongreso de la rusiaj esperantistoj en Peterburgo, en 1910, kiun ĉeestis Zamenhof, ne donis iujn principajn ŝanĝojn en la agado de la „Espero "kaj de la kelkaj aliaj, jam ekzistintaj tiutempe esperantistaj societoj en Rusio. Ili grupigis esperantistojn plejparte bone posedintajn la lingvon, sed malproksimaj de tiamaj seriozaj socipolitikaj problemoj.
La unua mondmilito fakte ĉesigis la evoluon de la rusia movado, kiu restariĝis post la februara revolucio en marto 1917.

Ektondris bruego de la Oktobra Socialisma Revolucio. Estis renversitaj la fundamentoj de la rusia politika, ekonomia kaj socia vivo. Al la potenco en la nova ŝtato venis novaj, antaŭe subpremitaj fortoj. La adeptoj de la malnova reĝimo ne deziris libervole fordoni la potencon kaj ekstaris sur la pozicioj de la kontraŭrevolucio, sabotado, teroro. Apogante sin sur la financan kaj militan helpon de la eksterlandaj imperialistoj, ili organizadis kontraŭrevoluciajn, „blankajn" armeojn en diversaj partoj de la lando, ĝoje salutis la militan intervenon de Anglio, Usono, Francio kaj Japanio. En la malfronto ili penis krei malordon kaj ekonomian ĥaoson.

Gravaj ŝanĝoj okazis ankaŭ en la rusia esperantista movado. La revolucio forigis ĉiujn obstaklojn, starigitajn de la carismo. Komenciĝis lavanga

kaj spontana organizado de esperantistaj grupoj, kursoj, komitatoj kaj unioj en multaj dekoj da urboj, urbetoj kaj eĉ vilaĝoj. La novaj kontingentoj-laboristoj, kamparanoj, ruĝarmeanoj, lernantoj, senpere ligis la ideon de la internacia lingvo kun la ideoj de la socialisma revolucio en Rusio kaj ekster ĝiaj limoj.

En 1919 aperis unua propaganda ruslingva broŝuro de Artjuŝkin-Kormilicin „Internacia lingvo de laboristoj kaj kamparanoj Esperanto". En la provinco esperantistoj komencis eldonadi kelkajn revuojn „Ruĝa esperantisto", „Informbulteno", „Steleto" k. a.

Por karakterizi la ideojn kun kiuj miloj da novaj esperantistoj ligadis Esperanton estas menciebla fakto el la vivo de la aŭtoro. Estante en 1920 studento, li, kun grupo de siaj samkursanoj volontule aliĝis al la Ruĝa Armeo por kontraŭbatali la intervenintojn kaj „blankulojn". En bataliono, en kiu li militservis estis politika gvidanto, malnova laboristo de granda metaluzino. Iufoje, dum batalinterrompo, li demandis la aŭtoron: „Ĉu vi aŭdis ion pri Esperanto?" Ricevinte malklaran, iom skeptikan respondon, li ekkriis: „Hontu, vi je estas studento, intelektulo! Kial vi ne komprenas, ke kiam ni frakasos la kontraŭrevoluciulojn kaj forĵetos la intervenintojn, ni iros okcidenten por helpi niajn fratojn, laboristojn liberiĝi de la kapitalista jugo? Kaj kiulingve ni interkompreniĝos? Ja laboristoj nenie posedas aliajn lingvojn. Krom la gepatrajn, ili ja ne havis instruistojn kaj guvernistinojn hejme, kiujn havigis al siaj infanoj la nobelaro kaj burĝaro. Kaj, jen, Esperanto estas lingvo de la tutmonda proletaro, helponta nian definitivan venkon!" Tiuj-ĉi vortoj de neklera homo, sed flama revoluciulo gravuriĝis en la memoro de la aŭtoro kaj tuj post fino de la intercivitana milito li aliĝis al la petrograda societo „Espero". Tiu ĉi societo, ludinta gvidan rolon en la rusia esperantista movado, ŝajne devus konservi tiun-ĉi rolon en la atmosfero de la postrevolucia granda progreso kaj entuziasma disvolviĝo de la movado de malsupre, fariĝi ĝia centro. Sed okazis io tute kontraŭa. Same, kiel la burĝaro kaj burĝa intelektularo la estraranoj de „Espero" estis certaj, ke la socialisma revolucio fiaskos en la plej proksima tempo, ĉar laboristoj kaj kamparanoj „ne kapablos gvidi la ŝtatan administradon kaj ekonomion", kaj sub frapoj de la kontraŭrevoluciaj armeoj kaj la intervenintoj la socialista ŝtato estos renversita kaj ĉio revenos al „la normala" burĝa sociordo.

Estas interese mencii unu karakterizan epizodon. En Petrogrado, en multaj loĝejoj de la burĝaro kaj nobelularo oni kaŝis provizon de nutraĵoj por pliprofundigi malsaton de la loĝantaro kaj armilaron, destinitan por planitaj ribeloj. Laŭ ordono de la soveta registaro la grupoj de laboristoj, soldatoj kaj maristoj faris traserĉadojn en suspektindaj domoj. La eksterlandaj ambasadorejoj kaj konsulejoj disdonadis al la eksterlandanoj, loĝintaj en Petrogrado speciale presitajn „Gardfoliojn" kun flagoj de la konformaj ŝtatoj. Sur la folioj estis presite: „Ĉi-tie loĝas eksterlanda ŝtatano. Lian loĝejon oni ne rajtas traserĉi".

Tiuj ĉi ruslingve skribitaj folioj estis alkroĉitaj sur la enirpordoj. La estraro de „Espero" preparis similajn foliojn kun verdaj flagoj kaj steloj kaj surskribo: „Ĉi-tie loĝas esperantistoj k. t. p." Tiujn ĉi foliojn oni vendadis por sufiĉe alta prezo. La aranĝo havis sukceson kaj baldaŭ multaj ne-esperantistoj — diversaj suspektindaj personoj, inkluzive la komplotintoj fariĝis amasaj aĉetantoj de la folioj. La estraro de „Espero" pligrandigis la eldonkvanton kaj triobligis la prezon, ricevante konsiderinde

grandan profiton. Estas klare, ke en tia animstato, la estraranoj de „Espero“ eĉ ne pensis pri iu helpo al la tutlanda esperantista movado: ilia sola taktiko estis trankvile atendadi la ŝajnintan al ili baldaŭan forigon de la sovetia potenco.

La iniciaton por ordigo de la amasa movado prenis je sin malgranda grupo de esperantistoj-komunistoj. Ili kreis en 1920 organizaĵon „Eski“ („Esperantista sekcio de Komunista Internacio“ poste transformitan je „Esperantista Komunista Internacio“). La estraro de „Eski“ (Ergeski) konsistis el esperantistoj Drezen, Ort Sunnam kaj Ofitovič. Ili publikigis Deklaron kaj kelkajn cirkulerojn, direktitajn al unuigo de ĉiuj progresemaj esperantistoj en la lando. Baldaŭ en multaj urboj aperis ESKI-grupoj. Por la estraro de ESKI estis klare, ke relative malgranda grupo de esperantistoj-komunistoj ne povas preni je sin organizadon kaj gvidadon de la ĉiutage kreskinta movado. Necesis kunvoki la tutrusian Esperanto-kongreson kaj fondi la tutsovetian organizaĵon. De la sovetia registaro venis aprobo de tiu-ĉi iniciato. Estis konstatite, ke la plej taŭga loko por la kongreso estas Petrogrado, kie malgraŭ malamika pasiveco de la estraro de „Espero“ ekzistis kelkaj junaj, energiaj kaj progresemaj esperantistoj. Ili komprenis, ke sen forigo de la funkciinta estraro neniuj aranĝoj en Petrogrado estis eblaj. Helpo venis de esperantistoj-politikaj elmigrintoj el burĝaj Estonio kaj Latvio, kiuj studis Esperanton en la malliberejoj de tiuj ĉi ŝtatoj kaj nunmomente lernis en petrograda komunista universitato, portinta nomon de pola revoluciulo Marĥlevski. Tio estis kamaradoj Ranca, Kalinka, Salo, Pedo-Vinkel k. a. Laŭ ilia iniciato pli ol 60 gestudentoj fariĝis membroj de la societo. La progresema anaro ricevis grandan plimulton. Estis elektita nova estraro, kies unua paŝo estis aktiva preparado de la III tutrusia (la unua sovetia) Esperanto-kongreso. La kongresan preparan komitaton eniris, krom la suprenomitaj esperantistoj, Bykovska, latva esperantisto Čače, Mader, Podkaminer kaj Teterin.

La 21an de majo 1921 en la palaco de estinta granda princo (onklo de la caro) okazis solena inaŭguro de la kongreso, kiun partoprenis pli ol 200 esperantistoj, el la plej malproksimaj regionoj de la lando. La kongreso fondis Sovetrespublikaran Esperantistan Unuiĝon (SEU), kiu baldaŭ fariĝis unu el la plej grandaj kaj aktivaj esperantistaj organizaĵoj en la mondo. SEU-komitatoj aperis en ĉiuj sovetiaj respublikoj, ĝiaj regionoj kaj urboj. Estis eldonataj kalkaj revuoj kaj multaj libroj — politikaj, beletraj, sciencaj, vortaroj kaj diversaj lerniloj.

Malfermiĝis nova kaj brila paĝo en la historio de la ruslanda esperantista movado, al kiu donis vivon Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

★

Sanĝoj en Rostock

Ni sciigas, ke k-do Günther Peters fordonis sian oficon kiel estro de la Distrikta Laborrondo Esperanto en Rostock.

K-do Peters dum 7 jaroj tre sukcese laboris, pro kio li meritas la plenan dankon de Centra Laborrondo, kies membro li ankaŭ estis.

La nova prezidanto de la Distrikta Laborrondo elektiĝis k-do Werner Plate, kiu antaŭe estis sekretario de la Distrikta Laborrondo. K-do Plate, meritplena iama Laborista Esperantisto en Rostock, jam enoficiiĝis.

Nia nuna pozicio en Kulturligo

La esperantistoj ekde 1965 agadas en Kulturligo de GDR samrajte kun aliaj fakgrupoj. Da ili ekzistas pli ol 35. Intertempe, tion oni povas nepre konstati, la agantoj de la internacia lingvo akiris sian firman lokon en la socialisma kulturorganizaĵo de GDR.

La IX-a Kongreso de Kulturligo akceptis novajn Bazajn Taskojn. Estas utile, iom prilumi la nunan pozicion de la esperantistoj en KL rigarde al tiuj novaj Bazaj Taskoj. Ol antaŭ tion fari iom pli detale en daŭrigota serio de artikoloj, ni volas fari kelkajn ĝeneralajn konstatojn. La situacio de la esperantista agado en la unuopaj distriktoj kaj subdistriktoj, kvankam ne unueca, ebligas jenajn konkludojn:

1. La esperantistoj havas ĉiujn eblecojn de agado. Tio signifas
   a) surbaze de la akceptitaj kaj validaj decidoj, gvidlinioj kaj taskoj de la esperantistoj en GDR kaj
   b) kongrue kun la ĝeneralaj celoj de la internacia Esperanto-movado, en kiu GDR aktive kunlaboras.

   Ĝenerale la teknikaj kaj financaj eblecoj por tia agado estas tre favoraj.

   Eĉ ne dekono de la realigata aktivado estus ebla, se ĝi estus financata de la membrokotizoj de la 1400 membroj. Krome, profesia oficejo sub tiaj cirkonstancoj estus tute neimagebla.

2. Ĉiam tie, kie la esperantistoj ne nur teorie postulas kaj postuladas ion de la ŝtataj instancoj aŭ de Kulturligo, sed mem konkrete kunagadas kun videblaj rezultoj, ĉiam tie la aprezo de Esperanto kreskas. Oni en funkciulaj rondoj ne malofte kun miro konstatas, ke relative malmultnombraj grupoj sukcesas realigi vere originalan internacian agadon. Tio alportis agnoskon kaj rekonon.

   Cetere, en la medioj de la kulturliga funkciularo jam nur malofte aŭdiĝas la konataj antaŭjuĝoj. Okazas ĉiam pli ofte, ke neesperantistaj funkciuloj de Kulturligo sen interveno de esperantistoj, memstare riparas eventualajn malĝustajn vidpunktojn de siaj kolegoj.

3. La preteco de Kulturligo, doni al la esperantistoj larĝajn agadoeblojn, estas multe pli granda, ol tion kapablas eluzi la esperantistoj. Ofte mankas spertaj kaj tempohavaj aktivuloj. Pro tio multo ebla restas nefarita.

4. Ankaŭ kreskas en Kulturligo la deziro utiligi la internaciajn ligojn de la esperantistoj por la *tuta* organizaĵo, do ankaŭ por la establo de internaciaj ligoj inter la filatelistoj, naturamikoj, fotoamatoroj k. a. (kp. la kontrakton inter Leipzig kaj Plovdiv, sur paĝo 14).

La evoluo de la esperantista movado ĝis nun seninterrompe estas pozitiva. Tamen, necesas pli funda kaj pli kritika analizo de la atingita stato, por povi tiri la ĝustajn konkludojn por la irota vojo. Por tio donas multajn instigojn ĝuste la novaj Bazaj Taskoj, akceptitaj de la IX-a Kongreso.

Lastatempe en nia agado videbliĝas iuj fenomenoj, ĝenerale pozitivaj, precipe tiam, se ili ankoraŭ plifortiĝados:

1. Estas konstatebla certa plijuniĝo de la gvidantaroj.
2. Ekzistas komencoj de organizita junulara agado.
3. Pli kaj pli ofte la „popolaj altlernejoj (fakte oficialaj plenkreskulaj vesperaj lernejoj kun larĝa oferto de kursoj) enprogramigas Esperanto-kursojn.
4. Gravaj fakaj materialoj (moderna lernolibro, instruistaj helpiloj, materialoj por aŭtodidakta studo, ampleksa vortaro, antologioj k. s.) pretiĝadas kaj tre baldaŭ estos disponeblaj.
5. Ekzistas principe pozitivaj spertoj kun korespondaj kursoj, kiuj tamen ĝis nun ankoraŭ troviĝas en eksperimenta stadio.
6. La pozicioj en la scienco konsiderinde plifortiĝis tiel, ke estas apenaŭ atendebla forta bremsa efiko de tiu flanko (ekzemple pro publikigado de materialoj kontraŭ Esperanto).
7. Ekritmiĝadas la beletra eldonado flanke de ŝtata eldonejo („Trigroŝa Romano“, „Nuda inter lupoj“, en 1978 aperos novelo de H. Böll).
8. Konturiĝas certa agado laŭ fakaj specialecoj (medicinistoj, fervojistoj).
9. La gazetoj, speciale tiuj en distriktoj kaj subdistriktoj, pli kaj pli ofte aperigas informojn pri Esperanto.
10. La sistemo de seminarioj por kadruloj forte establiĝis kaj donas unuajn kvankam ankoraŭ ne sufiĉajn rezultojn (novaj kadruloj).

Kompreneble tiuj pozitivaĵoj estas flankataj de tre kompaktaj mankoj, inter ili estu menciataj:

1. La kursaktivecoj pli malgrandiĝis lastatempe. Mankas bonaj kurs-gvidantoj. La nombro de kursoj por komencantoj ne povas sufiĉi kaj ne produktas sufiĉe da novaj membroj.
2. Kaj sekve la membronombro tro malrapide kreskadas.
3. Ankoraŭ la agado en distriktoj kaj subdistriktoj tro forte dependas de unu aŭ du „fervoruloj“. Ilia rezigno je agado (aŭ forpaso) ankoraŭ tro senteble influas la aktivecon. Ankaŭ en iuj distriktoj ne sufiĉas la kolektiveco de la gvidado.

   Gravaj informoj de CLE-kunsidoj akumuliĝas ĉe unuopuloj kaj ne estas pludonataj al la gvidkolektivoj.
4. Oni ankoraŭ ne povas paroli pri vera junulara movado. Nur en kelkaj distriktoj ekzistas grupoj. Ĝenerale temas pri unuopaj junuloj.
5. Ĝis nun ni ne sukcesis trovi unu aŭ du objektojn, kie ĉiujare povus okazi altnivelaj internaciaj esperantistaj aranĝoj. Tion atendas de ni la eksterlando, prave.
6. La publika agado (informado, varbado, gazetara publikigado k. s.) tro ofte estas farata nur sporade kaj mankhave.
7. La lingva nivelo de multaj GDR-esperantistoj ankoraŭ ne atingis la necesan internacian nivelon. Unu el la kaŭzoj estas manko de kleriga kaj ekzamena sistemo.
8. Mankas pozicioj inter la laboristoj. Al sindikatoj Kulturligo bedaŭrinde ne havas fortajn ligojn.

Internacia Seminario en Ahrenshoop:

„Sciencaj aspektoj de Esperanto“

Respondante al la plifortiĝanta bezono organizi kaj kunordigi la internacian sciencan spertinterŝanĝon kaj esploradon pri interlingvistiko/esperantologio Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR (Fakgrupo interlingvistiko/esperantologio) okazigis de 17-a ĝis 23-a de aprilo 1978 en Ahrenshoop (norda GDR) internacian seminarion pri la temo „Sciencaj aspektoj de Esperanto“. 31 partoprenintoj, fakekspertoj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio resumis en 31 prelegoj kaj pli ol 150 diskutkontribuoj multajn gravajn atingojn, vidpunktojn kaj esplorproblemojn el la kampoj de interlingvistiko kaj esperantologio. Oni aŭskultis jenajn prelegojn „Scienca okupiĝo pri planlingvaj problemoj kaj la Esperanto-movado“ (d-ro D. Blanke, GDR), „Sistemo de la internacia lingvo-uzo“ (d-ro A. Ratkai, Hungario), „Sociologio de la lingvo, sociolingvistiko, interlingvistiko“ (d-ro J. Leyk, Pollando), „Metodoj por taksi kaj kompari ĝeneralajn planlingvojn“ (inĝ. A. Münnich, Hungario), „Kelkaj etnologiaj problemoj kaj interlingvistiko“ (d-ro J. Jermař, ĈSSR), „Problemoj de movadhistoriaj esploroj“ (d-ro A. Ratkai, Hungario), „Problemoj de dokumentado, informado kaj bibliografiado sur la kampo de interlingvistiko kaj esperantologio“ (Lic. M. Ĝivoje, Jugoslavio), „Interlingvistiko en Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, USSR“ (prof. d-ro S. Ĝuĝev, d-ro J. Jermař, d-ro D. Blanke, d-ro I. Szerdahelyi, M. Ĝivoje, Mag. J. Uspienski, prof. d-ro F. Bociort), „Pri la lingvistika priskribo de Esperanto“ (d-ro I. Szerdahelyi, Hungario), „Modelo de la Esperantaj leksoformoj“ (d-ro J. Leyk), „Komparo de etnolingvo kaj planlingvo“ (d-ro D. Blanke), „Eblecoj kaj malfaciloj de interkompreno por parolantoj kies gepatraj lingvoj apartenas al malsamaj fonologiaj sistemoj“ (prof. d-ro S. Ĝuĝev, Bulgario), „Ĉu optimuma son-

---

9. Senteblas pli kaj pli la manko de bonaj fakuloj. Tio estas lingvoinstruistoj, metodologoj, tradukistoj kaj originale verkantoj, terminologoj, historiistoj, interlingvistoj kaj esperantologoj, oratoraj talentoj k. t. p.
10. Pro kvanta malforteco ni ofte ne kapablas laŭi al la certaj deziroj de la eksterlandaj frataj organizoj (ekz. turisma interŝanĝo, kunlaboro inter junularaj grupoj k. t. p.).

Ni do povas konkludi, ke ni vere atingis konsiderindan nivelon en nia agado kaj samtempe devos pli kaj pli klare vidi, kio estas urĝe solvenda. Necesas atingi tute novan kvaliton. Ni diskutu pri la irendaj vojoj.

D. Blanke
(daŭrigota)

sistemo? Eblaj metodoj serĉi optimumojn en la interhoma perbuŝa komunikado“ (T. Vasko, Hungario), „La baza kaj minimuma Esperanto-vortaro“ (prof. A. Boia, Rumanio), „Prezento de kulturo per Esperanto“ (prof. d-ro F. Bociort, Rumanio), „Teknikaj vortaroj en Esperanto – problemoj de fakterminologio en Esperanto“ (d-ro L. Fritsch, ĈSSR), „Problemoj de la praktika apliko de Esperanto kiel lingvo de la scienco“ (d-ro A. Mathe, Hungario), „Ĉefaj direktoj de la agado por evoluigi la sciencan kaj fakan aplikadon de Esperanto“ (d-ro O. Haszpra, Hungario), „Problemoj kaj taskoj de esploro de la scienca esperantlingva libro“ (Mag. I. Brachel), „ISAE-aplikado de Esperanto“ (d-ro J. Kavka, ĈSSR, ne ĉeestis persone), „Komputado kaj lingvistiko“ (inĝ. A. Münnich), „Esperanto kiel objekto de komputiloj“ (d-ro P. String, GDR), „La pedagogia valoro de Esperanto kiel lerneja studobjekto“ (d-ro I. Szerdahelyi), „Latinidaj planlingvoj el la vidpunkto de latinisto“ (V. Barandovska, ĈSSR). Krome d-ro E. Krause (GDR) prelegis diapozitive pri la aziaj landoj de li vizititaj. D-ro D. Blanke informis pri CED. Ne nur la alta nivelo de la prelegoj kaj diskutoj sed ankaŭ la intensivaj du- kaj plurflankaj rilatoj inter la fakkolegoj alportis por ĉiu konsiderindan fakan gajnon. Kiel substrekis prof. d-ro V. Falkenhahn, la gvidanto de la fakgrupo interlingvistiko/esperantologio ĉe CLE, la gastiganto havis kaŭzon tre ege danki al la partoprenintaj fakkolegoj pro la granda intelekta kontribuo, kiu faris la seminarion vere sukcesa.

La partoprenintoj akceptis leteron senditan al prof. B. Popoviĉ „Jugoslavio), longjara prezidanto de ISAE kaj ĉefredaktoro de „Scienca Revuo“, en kiu ili dankis pro la grava farita scienca laboro. Oni krome akceptis rekomendan deklaron (vidu sube). Estas planite, unue aperigi resumojn de la prelegoj kaj, pli poste, la kompletajn prelegojn.

Multaj de la fakkolegoj certe rerenkontiĝos en Budapest, okaze de la I-a Internacia Interlingvistika Konferenco (vidusube) por daŭrigi la temojn en pli larĝa skalo.

★

I-a Interlingvistika Konferenco

Laŭ la propono de la universitatoj Venecio (Italio) kaj Budapeŝto (Hungario) de 24a ĝis 28a de julio 1978 okazos en la ELTE-Universitato de Budapeŝto la I-a Internacia Interlingvistika Konferenco. Anonciĝis pli ol 60 interlingvistoj/esperantologoj el eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. La laborlingvo estos Esperanto. Krome okazos prelegoj en la angla, franca, rusa lingvoj. La kadro-temoj estos ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, sociolingvistiko kaj lingvopolitiko, interlingvistiko kaj esperantologio.

La konstanta adreso de la konferenca sekretariejo estas Universitato ELTE/BTK, Interlingvistiko-Esperanto, 1364 - Budapest V, Pesti Barnabás 1–3, Hungario.

Komuniko

pri la Internacia Seminario „Sciencaj Aspektoj de Esperanto" aranĝita inter la 17a kaj 23a de aprilo 1978 en Arenshoop/ Germana Demokratia Respubliko

Laŭ la invito de la Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko, CLE, Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio, el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, kunvenis fakuloj pri interlingvistiko, esperantologio kaj sciencaj kaj fakaj aplikadoj de Esperanto por pritrakti sciencajn rezultojn kaj ĝenerale trarigardi la situacion sur menciitaj kampoj kun la celo signi la plej gravajn direktojn, de la scienca agado kaj ties bazajn antaŭkondiĉojn por la sekva kelkjara periodo.

La partoprenintoj, post aŭskultado kaj pridiskutado de prelegoj, konstatis, ke la interesiĝo kaj aktivado pri sciencaj esploroj sur diversaj kampoj de interlingvistiko dum la lastaj jaroj konsiderinde plifortiĝis kaj same iĝis konsiderinda kaj pli celhava la aplikado de Esperanto sur sciencaj kaj fakaj terenoj.

Dum la diskutado iĝis evidenta, ke estas kelkaj kampoj sur kiuj estas necese forigi gravajn mankojn, ĉefe en la organiza kaj informada terenoj. Tio estas antaŭkondiĉo por pli intensa evoluigo de la scienca laboro mem. Konsiderante, ke interlingvistikaj esploroj havas esencan signifon por la solvo de la monda lingva problemo estas nepre necese plu disvolvi la ĉirilatan sciencan laboron.

Specialan atenton oni devas dediĉi al la kontentigo de la lingvaj bezonoj de la scienca kaj faka komunikado. La ĝisnunaj spertoj kaj faktoj pruvas, ke Esperanto estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la scienco. Tial estas necese disvastigi la aplikon de Esperanto je ĉiam pli multaj sciencaj kaj fakaj terenoj. Tio nepre signifas ankaŭ intensigon de la fakterminologia laboro.

Estas grave kreskigi la proporcion de la utiligo de Esperanto en la sciencoj. Ŝajnas laŭcele, ke la fortostreĉoj estu farataj kaj por la bazaj sciencoj (filozofio, matematiko, fiziko k. t. p.) kaj, laŭ eblecoj, por la unuopaj aplikataj sciencoj. Por atingi la supre prezentitajn ĝeneralajn celojn estas bezonataj establo respektive plibonigo de efikaj organizaj kaj informadaj sistemoj (ekzemple: organizo de interlingvistikaj laborgrupoj naciaj kaj internaciaj, estigo de internacia institucio utiliganta Esperanton por ĉiuj branĉoj de la scienco, establo de landaj kaj centra informaj kaj kontaktigaj servoj koncerne eldonaĵojn, aktivadojn kaj adresarojn).

Estas konsilinde, ke la diversloke aranĝataj kaj diverstipaj naciaj kaj internaciaj kunvenoj de esperantistaj sciencistoj ĉiam turnu sian atenton ne nur al la konkretaj sciencaj problemoj, pro kiuj ili kunvenis, sed ankaŭ al la perspektivaj bezonoj de la scienco koncerne la uzadon de la internacia lingvo Esperanto.

„Ĉu Esperanto estas nura ilo?“

demandas s-ano Aleksandro Ĥarkovski el Moskvo en sia letero al dro D. Blanke („der esperantist“ nro 1/1978) kaj celas pruvi, ke Esperanto estas ne nura ilo, sed iom pli.

Havante la feliĉon koni persone ĉiujn tri disputantojn: k-don Jaan Ojalo, dron D. Blanke kaj k-don A. Ĥarkovski, mi kiel simpla Esperanto-uzanto, homo, senpartia, klopodos observi neŭtrale la temon.

Miaopinie Esperanto kiel lingvo sendube estas la rimedo, la ilo por interkompreniĝo inter homoj kaj homgrupoj kun malsamaj lingvoj. Fakte kiel tia povus servi kia ajn lingvo, se homoj konsentos uzi ĝin. Por ekz. en Sovetunio servas por tiu celo la rusa inter la 130 naciaj lingvoj, en Ĉinio la skriba formo de han-lingvo ktp. Sed Esperanto havas nekontesteblan premison kiel ilo por internacia rilatado: ĝi estas speciale kreita por tiu celo.

Same kiel ĉiu ajn specialigita ilo pli bone taŭgas por sia celo, ankaŭ E-o nekompareble pli bone plenumas la devojn de internacia rilatilo.

Tiun econ de E-o oni pruvis multfoje. Nur kelkaj apartaj ideologiaj vidpunktoj bremsas la realigon de kapabloj de E-o, same kelkaj eltempiĝintaj antaŭjuĝoj pri „artefarita“ ktp. lingvo malhelpas la ekuzadon de E-o en la vivo internacia. Miaopinie ĝuste la marksistoj devus reale konsideri la kapablojn de E-o por adapti ĝin, ĉar Marx, esprimante en la grava slogano „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!“ Ne diris, per kiu lingvo ili tion faru. Sed inter marksistoj ne ankoraŭ estas klara starpunkto pri tiu demando. Kiel ilo por tio plene taŭgas la speciale kreita Internacia Lingvo Esperanto.

Inter la lingvouzantoj dum la 90 jaroj la ilo (= la lingvo) mem kreskis, fortiĝis, moderniĝis, la kapablo esti internacia kunportis certan esperantistan ideologion, kiun k-do Ojalo aludas kiel „apartan atmosferon“ dum internaciaj kongresoj, kaj kiun klopodas protekti k-do Ĥarkovski. Li nomas Esperanton portanto de internacia kulturo . . .

Sed k-do Ĥarkovski asertas, ke „Ne, internacia kulturo ankoraŭ ne ekzistas — pro tio pri ĝi ne parolis niaj grandaj marksistaj filozofoj“.

Kara amiko Ĥarkovski, vi forgesas, ke dum tiu tempo, kiam skribis siajn verkojn Marx kaj Engels, Esperanto ankoraŭ ne ekzistis kaj do portata de ĝi internacia rilatado ankaŭ ne ekzistis. Eĉ dum vivo de Lenin E-o kaj ĝia influo estis tro malgrandaj. Sed tio tute ne signifas, ke n u n, post preskaŭ jarcento, internacia kulturo ne ekzistas. Nun ĝi *jam ekzistas*, kaj kvankam juna, ĝin ĉiuflanke evoluigas kaj fortigas la Internacia lingvo, la ilo. Internacia literaturo estas nur unu ero de la internacia kulturo. Eventuale Esperanto jam montris siajn kapablojn en brila tradukado de majstroverkoj de la mondliteraturo, kaj per tio la ilo konstruis la internacian kulturon pli forta. Ni devos ankoraŭ pli forte, pli persiste uzi la lingvon-ilon por per ĝi konstrui la internacian kulturon. Ni devos kunglui per la internacia lingvo ne sole literaturon, sed ankaŭ la atingojn de teknika kaj scienca progreso, la mondkonceptojn, ideologiojn, la plej valorajn erojn de naciaj kulturaj trezoroj en unu kompaktan tuton, kiu estas la internacia kulturo, kaj kiun kungluos la ilo, la lingvo internacia.

Johannes Palu, Tallinn

BERTOLT BRECHT: TRIGROŜA ROMANO

(Traduko: D-ro Karl Schulze). Eldonejo Edition Leipzig (1977), 374 p. Prezo: 15,– M

Okaze de la 80-a naskiĝdatreveno de Bertolt Brecht (10. 2. 1898—14. 8. 1956) malfermiĝis la pordoj de nova moderna Brecht-centro en lia rekonstruita loĝdomo en Berlin. Reprezentantoj el 30 landoj partoprenis internacian forumon „Arto kaj politiko“ omaĝe al la kontribuo de Brecht por la aliigo de la mondo direkte al socialismo.

Ĝustatempe enviciĝis nove aperinta traduko en Esperanto de „Trigroŝa romano“ fare de d-ro Karl Schulze, plua mozaika ŝtoneto en la interesa historio de la trigroŝa temo.

Elisabeth Hauptmann, kunlaborantino de Brecht en la dudekaj jaroj, direktis lian atenton al „Almozula opero“ de la anglo John Gay, sukcese reenscenigita en Londono 1928. En ĝi Brecht trovis la de li preferatan miksaĵon el ekzotiko kaj aktualeco bezonata por la propraj intencoj. Plezure li tuj komencis transforĝi la teatraĵon, forlasante por li netaŭgajn scenojn, eltrovante novajn, transformante agantajn personojn. Tia estis lia maniero: malamikoj nomis ĝin senhonta ŝtelado, plagiato, amikoj nomis ĝin adapto, prilaboro. Sed la „Almozula opero“ (1728) jam mem estis adapto, estis malica parodio de John Gay, kritiko de la tiamaj artefaritaj italmanieraj operoj kaj aludo pri la nemorala vivo de tiam vivantaj korteganoj kaj altranguloj. Gay senmaskigis ilin anstataŭante altrangulojn per almozuloj, putinoj, ŝtelistoj kaj trompistoj kaj li anstataŭis ankaŭ la artozan muzikon per popolaj britaj kanzonoj kaj melodioj.

Brecht transponis la okazintaĵojn al la Londono de la 19-a jarcento. Li ne celis trafi certajn samtempulojn sed la dorsoflankon respektive la veran naturon de la kapitalisma sociordo ĝenerale. Li montris la principan parencecon de ĉiuj formoj de la kapitalisma negocado, de la plej honestaj ĝis la plej dubindaj. Liaj ŝtelistoj kaj trompistoj eĉ ne kaŝas sian agadon, ili estas konvinkitaj esti ne pli aĉaj ol ĉiuj negocistoj. „Boneco, pli ol krud' ĝojigus nin, sed cirkonstancoj ne permesas ĝin!“

Lion Feuchtwanger proponis la titolon „Trigroŝa opero“ kaj Kurt Weill liveris la muzikon, atakon kontraŭ la tiama ŝato de dolĉaj operetoj. Li uzis elementojn de nordamerika ĵazo kaj folkloro.

La historio de la unua prezentado en Berlin en 1928 estas historio de katastrofoj. Kelkaj ĉefaktoroj malsaniĝis lastminute, aliaj rifuzis ludi tian „nemoralan“ teatraĵon. La tre vanta rolinto de Macheath (Paulsen) postulis enir-kanzonon kiu temas nur kaj sole pri li. Brecht grumblis, sed sekvinttage alportis „La moritaton de Mackie Messer“. Kurt Weill dum la nokto komponis la melodion, hodiaŭ mondkonatan. La lasta ĝenerala provludo daŭris ĝis matene la 5-a, neniu kredis pri sukceso. Tamen la publiko post komenca konsterno akceptis la ideon kaj freneze aplaŭdis. La tuta urbo kantis kaj fajfis la melodiojn. La stilo de Brecht kaj Weill estis kopiita ĝis netolereblo.

Eĉ en 1978 ne mankas nova adapto de „Trigroŝa opero“. Ĉar „Deutsches Theater“ en Berlin malhavas la aŭtorajn rajtojn, Heinz Kahlau, adepto de Brecht, verkis novan parodion „Galoŝa opero“ kaj Reiner Bredemeyer parodis la muzikon de Weill. Ekestis brila, amuza burleskaĵo.

Alie la „Trigroŝa romano“. — Venis la jaro 1933 kaj Brecht devis elmigri. Kiel dram-verkisto li ne plu povis atingi la publikon per teatraĵoj. Projekto, filmigi la „Trigroŝan operon“ fiaskis ĉar Brecht rifuzis mildigi la akran politikan satiron. Li vole nevole komencis verki prozon. 1934 en Amsterdam aperis „Trigroŝa romano“, lia plej signifa proza verko, laŭ motivoj de „Trigroŝa opero“. Sed inter opero kaj romano kuŝis jaroj de granda politika sperto kaj maturiĝo kaj intensaj studoj de marksismo. Novaj vidpunktoj estis gajnitaj.
Neeblas rezumi la travivaĵojn kaj agadojn de la agantaj personoj, prototipoj de kapitalisma sociordo. Brecht parodis biografiojn de la ascendo de famaj viroj. Mackie Messer ascendas de fia krimulo ĝis honesta entreprenisto kaj bankisto. „Kio estas prirabo de banko kompare al fondiĝo de banko? Kio estas murdo de viro kompare al dungo de viro?“ Gvida motivo de la romano estas: „Ĉiuj modernaj entreprenistoj agas same“, ĉu bankistoj, ĉu organizantoj de la rabista kaj ŝtelista medio. Detale Brecht prezentas la rabeman praktikon kaj psikologion de la kapitalisma „granda mondo“. La figuroj senmaskigas sin mem. Ŝajna moralo baldaŭ montriĝas kiel nura imitaĵo de sentimentala etburĝa honesto.
Mankas aŭtoraj komentarioj, sed kvazaŭ memorigiloj pri la poeto Brecht konzonoj kaj baladoj spicas la romanon kaj substrekas la aŭtoran intencon (ekz. „Kanto pri la nesufiĉo de homa strebado“, „Balado pri Hanna Cash“, „La moritato pri Mackie Messer“, „Balado pri la agrabla vivo“, „Revoj de kuireja knabino“).
Por la literatur-traduka talento kaj la zorga laboro de la tradukinto d-ro Karl Schulze parolas ekzemple komparo de tri tradukoj de la „Moritato pri Mackie Messer“ („d. e.“ n-ro 22/23, p. 24 / trad.: PAVO, „d. e.“ n-ro 54, p. 21 / trad.: d-ro Schulze kaj „Trigroŝa romano“, p. 119). Ankaŭ la lingva kontrolo fare de Jerzy Grum garantias bonan Esperanton kaj lingvan ĝuon.
Nenia miraklo, ke la nove aperinta romano jam preskaŭ elĉerpiĝis, esperantistoj el socialismaj landoj mendu pere de siaj asocioj, esperantistoj el nesocialismaj landoj nur povas mendi ĉe eldonejo Bleicher en FGR, kontraktinto de eldonejo Edition Leipzig, GDR.
La „Trigroŝa romano“ indas stari en la libroŝranko de ĉiu esperantisto, kompreneble nur post atenta studado.

Linde Knöschke

*

5-a plenkunsido de CLE

La 2-an kaj 3-an de julio 1978 okazis en Cottbus la 5-a plenkunsido de CLE. Ĝin partoprenis d-ro Gerhard Mertink, dua ligo-sekretario de Kulturligo, membro de la Prezidio, kiu prelegis pri aktualaj ideologiaj problemoj, speciale sur la kampo de kulturo. CLE krome traktis pri la rezultoj de la XI-a Konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de socialismaj ŝtatoj en Proprad, raportis pri la scienca seminario en Ahrenshoop kaj traktis pri la preparlaboroj de la IIIa Centra Renkontiĝo de esperantistoj en GDR okazonta de 13. – 15. oktobro en Rostock. Krome sur la tagordo estis la Esperanto-kongresoj en Bulgario kaj la ampleksa problemaro de la klublaboro, pri kiu donis ampleksan enkondukon Werner Pfennig. Centra Laborrondo kooptis unuanime kiel sian novan membron *d-ron Karl Schulze* pro ties literaturaj meritoj kiel tradukisto.

Invitita de la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv, delegacio de la Distrikta Estraro de Kulturligo Leipzig gastis de la 9a ĝis la 14a de septembro en Plovdiv. Tie s-roj d-ro Fiedler kaj W. Becker intertraktis kun diversaj kulturaj instancoj. Jürgen Hamann interpretis la traktadojn (kiuj senescepte funkciis per Esperanto) kaj traktadis kun reprezentantoj de la DE de BEA en Plovdiv. La rezultoj de la interparoloj perspektive multpromesas. Inter DE de BEA Plovdiv kaj DLR Esperanto Leipzig estis subskribita „Kontrakto pri kunlaboro".

Kontrakto

pri la kunlaboro inter la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Plovdiv kaj la Distrikta Laborrondo Esperanto Leipzig en Kulturligo de GDR

Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio Plovdiv kaj Distrikta Laborrondo Esperanto Leipzig en Kulturligo de GDR (en la plua teksto nomitaj: Distriktaj Estraroj)

samopinias, ke la ĉefceloj de ambaŭ Distriktaj Estraroj kongruas kaj ke necesas ankoraŭ pli efike utiligi la internacian lingvon Esperanto por la idealoj de socialismo kaj internaciismo en la mondo;

decidas, konsiderante la neceson realigi la supre formulitajn ĉefideojn, subskribi kontrakton pri kunlaboro kaj realigi jenajn ĉeftaskojn:

§ 1

Regulaj interkonsultiĝoj inter la Distriktaj Estraroj por interŝanĝi spertojn pri la praktika apliko de la internacia lingvo en la servo de la socio.

§ 2

Akcelado de aktivecoj servantaj al
- la organizado de komunaj kulturaj aranĝoj kaj diversspecaj renkontiĝoj
- interŝanĝo de prelegantoj.

§ 3

Ambaŭ Distriktaj Estraroj
- dediĉos apartan atenton al la agado inter la junularo
- interŝanĝos materialojn kaj informojn servantajn al la realigo de tiu-ĉi kontrakto.

§ 4

Ambaŭ Distriktaj Estraroj decidas, ke la detaloj de la kunlaboro, la unuopaj taskoj kaj formoj estas difinitaj en protokoloj ĉiujare interkonsentotaj. La protokoloj estos aparte precizigantaj la unuopajn entreprenojn, difinante iliajn datojn, la financan flankon kaj la nomojn de la personoj, respondecaj pri ili. La protokolojn oni ellaboros obeante la jurajn preskribojn validajn en la unuopaj landoj.

§ 5

Ambaŭ Distriktaj Estraroj interkonsentas, ke ĉiuj formoj de la kunlaboro devas sekvi la principon de la egaleco en la financaj procedoj.

§ 6

La kontrakton oni povas ŝanĝi aŭ kompletigi laŭ la deziro de unu el la kontraktantoj. Tio samvalidas por la protokoloj kaj interkonsentoj.

§ 7

La versioj de ĉi-tiu kontrakto en bulgara, germana kaj Esperanto lingvoj estas same aŭtentikaj.

§ 8

La kontrakto estos konigita en konvena formo al la membroj en la teritorioj, en kiuj agas la Distriktaj Estraroj.

§ 9

La nuna kontrakto, inkluzive la jarajn protokolojn kaj — se necese — ankaŭ ŝanĝojn kaj kompletigojn plipreciziganta j ĝin, estas aprobenda de la koncernaj aŭtoritatoj, inspektantaj ĉiun el la Distriktaj Estraroj, konforme al la validaj preskriboj.

Plovdiv 1977-09-13

Por DE de BEA Plovdiv:

Miĥail Dančev (Prezidanto)

Fani Miĥajlova (Sekretario)

Por DLR Esp. Leipzig:

Jürgen Hamann (Prezidanto)

Wolfgang Becker (Sekretario)

Honorigo por aŭstra batalanto

El la mano de la prezidento de Aŭstrio la malnova komunisto Franz Haiderer 1977 ricevis la honormedalon por la liberigo de Aŭstrio el sub la nazia terorreĝimo.

Franz Haiderer aktivas ekde 1927 en la laborista movado, suferis dum la aŭstro-faŝismo pro revolucia agado en la karcero, fuĝis el ĝi kaj elmigris al Ĉeĥoslovakio. 1936 li vojaĝis al Hispanio kaj aliĝis al la Interbrigadoj. Li estis vundita dufoje. 1939—1941 Franz Haiderer estis tenata en internejo en Francio kaj transdonita 1941 de la franca registaro al la Gestapo, kiu lin ĵetis en la koncentrejon de Dachau. Laŭ ordono de Hitler oni lin kune kun aliaj internaciistoj kondamnis al morto la 27an de aprilo 1945. Sed la funkciinta solidareco de ĉiuj nacioj savis lin. La koncentrejo estis liberiigia la lan de majo 1945. Franz Haiderer lernis Esperanton en malliberejo 1928, estis membro de la Internacio de Proleta Esperantistaro kaj ankaŭ nuntempe apartenas al la plej agemaj membroj de la Kolektivo Esperantista Komunista (KEK) en Aŭstrio. Tiu Kolektivo eldonadas laboristan periodaĵon „Internaciisto", jam dum la 5a jaro.

Al la distingito CLE kore gratulas dezirante ĉion bonan por la estonteco.

CLE

★

Ekspozicio

Somere de 1978 okazos I-a Internacia Ekspozicio de infandesegnaĵoj sub la devizo: „Infanoj de Siberio amikas kun infanoj de la tuta mondo". Ĉe la desegnaĵoj bonvolu noti la adresojn, ĉar ĉiu ricevos siberian vidaĵon. Sendu al: Esperanto-klub, p. k. 11, Barnaul-99, 656099, USSR.

La gazetaro pri ni 1977

1. Tutrespublikaj organoj

- „Junge Welt“, Berlin, (organo de Libera Germana Junularo), 5./6. 2. 77, Kunlaboro de la junularo en soc. landoj
- „Der Morgen“, Berlin, (organo de LDPD), 22. 3. 77, Membroj de la E-o-Komisiono de Soveta Unio en Potsdam; 12. 8. 77, Ĝenerala direktoro de UNESCO en Reykjavik; 19. 10. 77, Esperanto-salutoj el Miedzygorce
- „Tribüne“, Berlin, (organo de sindikatoj), 19. 10. 77, Fakterminologioj en Esperanto; 30. 11. 77, Brecht-romano en Esperanto
- „Sonntag“, Berlin, (organo de Kulturligo), 30. 10. 77, Memoro al Rudi Graetz
- Humanitas“, Berlin, (organo de medicinistoj), 18/77, 1-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en Krakov
- „Bauernecho“, Berlin, (organo de Kamparana Partio), 26. 11. 77, Trigroŝa Romano en Esperanto
- „Fahrt frei“, Berlin, (organo de fervojistoj), julio 1977, Formiĝo de fervojista fakgrupo

2. Distriktaj kaj subdistriktaj organoj

2.1. Cottbus

- „Lausitzer Rundschau“, Cottbus, SED, 3. 8. 77, D-ro Brosche honorigita en Krakovo; 23. 9. 77, Esperanto en la batalo por la paco

2.2. Dresden

- „Sächsisches Tageblatt“, Dresden, NDPD, 13. 5. 77, Tradukekzerco; 20. 5. 77, Tradukekzerco; 3. 6. 77, Tradukekzerco; 16. 9. 77, Tradukekzerco; 6. 10. 77, Fakterminologioj en Esperanto; 14. 10. 77, Bondezirkarto en Esperanto
- „Sächsische Zeitung“, Dresden, SED, 17. 6. 77, Distrikta Del. Konferenco de Kulturligo; 10. 11. 77, Esperanto-Renkontiĝo kun soveta gasto
- „Sächsische Zeitung“, Zittau, SED, 5. 1. 77, Honorigo de esperantisto el Zittau; 20. 10. 77, Esperanto-renkontiĝo kun internaciaj gastoj
- „Sächsische Zeitung“, Riesa, SED, 23. 3. 77, Esperantistoj el Riesa decidis pri novaj taskoj
- „Sächsische Zeitung“, Meißen, SED, 1. 11. 77, Prof. Podkaminer en la Leonhard Frank lernejo; 15. 11. 77, nova kurso
- „Die Union“, Dresden, 3. 8. 77, 90 jaroj Esperanto; 26. 10. 77, Internacia Esp.-renkontiĝo en Pirna

2.3. Erfurt

- „Thüringische Landeszeitung“, Weimar, SED, 15. 3. 77, Diversspecaj aktivecoj de laborgrupoj en Kulturligo; 18. 10. 77, Klarigoj en Esperanto dum la kastelgvidado en Eisenach
- „Thüringer Neueste Nachrichten“, Erfurt, NDPD- 22. 10. 77, Mondvastaj rilatoj de esperantistoj el Weimar; 5. 11. 77, Fakterminо-

logioj en Esperanto; 6. 12. 77, De kiam ekzistas Esperanto kaj kiamaniere oni uzas ĝin en GDR?
- „Das Volk“, Eisenach, 20. 10. 77, Esperanto-renkontiĝo

2.4. **Gera**

- „Volkswacht“, Gera-Land, 7. 1. 77, Esperanto kiel senchava hobio

2.5. **Halle**

- „Liberal-Demokratische Zeitung“, Halle, NDPD, 5. 3. 77, nova kurso por komencantoj; 23. 3. 77, nova Esperanto kurso; 13. 4. 77, Gastoj el Soveta Unio kaj Ĉeĥoslovakio; 28. 7. 77, 90 jaroj Esperanto
- „Der Neue Weg“, Halle, 23. 3. 77, Esperantistoj el Soveta Unio gastis en Halle
- „Freiheit“, Halle, SED, 9. 9. 77, 90 jaroj Esperanto; 27. 9. 77, Internacia Esperanto letervespero en Halle

2.6. **Karl-Marx-Stadt**

- „Freie Presse“, Annaberg, SED, 28. 7. 77, Esperanto – sociala tasko
- „Freie Presse“, Schwarzenberg, SED, 24. 3. 77, Renkontiĝo kun amikoj de Esperanto; 5. 4. 77, Junaj esperantistoj informiĝis pri la Laborista Esperantista Movado; 2. 8. 77, Amikoj pere de Esperanto; 29. 7. 77, 90 jaroj Esperanto; 25. 8. 77, Salutoj el la Latvia Soc. Respubliko; 19. 10. 77, Bonaj ligoj kun klubo en Chmelnitz
- „Freie Presse“, Werdau, SED, 11. 1. 77, Esperanto-komunikaĵo el Kubo; 2. 2. 77, Esperantistoj salutas L. Corvalan

2.7. **Leipzig**

- „Leipziger Volkszeitung“, Roßwein, SED, 25. 2. 77, Loka Del. Konferenco de Kulturligo en Roßwein
- „Leipziger Volkszeitung“, Borna/Wurzen, SED, 1. 3. 77, Informoj pri foresta studo
- „Leipziger Volkszeitung“, Döbeln, SED, 5./6. 11. 1977, Ekspozicio logioj en Esperanto
- „Leipziger Volkszeitung“, Döbeln, SED, 5./6. 11. 1977, Ekspozicio en fabrika lernejo Roßwein
- „Mitteldeutsche Neueste Nachrichten“, Leipzig, NDPD, 7. 3. 77, Ses demandoj rilate la internacia lingvo Esperanto; 13. 4. 77, Sovetaj Esp.-amikoj en Halle; 25. 10. 77, 90 jaroj Esperanto; 24. 12. 77, Poŝtmarkoj kun Esp.-teksto
- „Die Union“, Leipzig, 28. 4. 77, Esperanto kaj ties uzado

2.8. **Magdeburg**

- „Magdeburger Zeitung“, Magdeburg, 11. 8. 77, 90 jaroj Esperanto; 20. 10. 77, Preparo de la 60a datreveno de Ruĝa Oktobro
- „Liberaldemokratische Zeitung“, Magdeburg, 12. 8, 77, Esperanto – viva lingvo; 29. 11. 77, Kunsido de CLE en Magdeburg

2.9. **Neubrandenburg**

- „Freie Erde“, Neubrandenburg, SED, 5. 4. 77, Kio estas Esperanto?; 6. 4. 77, Prelego pri Esperanto; 13. 4. 77, Kio estas Esperanto?; 29. 10. 77, Renkontiĝo kun amikoj el Koszalin
- „Freie Erde“, Templin, SED, 10. 5. 77, Kursoj en la Popola Altlernejo Templin; 17. 5. 77, Kursoj en la Popola Altlernejo Templin

– „Freie Erde“, Neustrelitz, SED, 28. 5. 77, Kunsido de CLE en Neubrandenburg; 8. 9. 77, 90 jaroj Esperanto
– „Demokrat“, Neubrandenburg, 21. 3. 77, Koresponda kurso; 21. 5. 77, Koresponda kurso; 21. 5. 77, Kunsido de CLR en Neubrandenburg; 25. 5. 77, Kunsido de CLE en Neubrandenburg; 28. 5. 77, Kunsido de CLE en Neubrandenburg

2.10. **Potsdam**

– „Märkische Volksstimme“, Potsdam, SED, 11. 3. 77, VIIa Ĝenerala Konferenco de MEM en Ruse; 17. 3. 77, Gastoj el Soveta Unio; aprilo, Esp.-movado de GDR en UEA; 28. 4. 77, Partopreno de laborgrupo Esperanto Rathenow al ekspozicio de Kulturligo; 12. 8. 77, Kvarteto Esperanto el Trenčin; 20. 9. 77, Multflankaj interesoj estas konsiderataj
– „Märkische Union“, Potsdam, CDU, 20. 3. 77, Sovetaj gastoj; 21. 3. 77, Bonaj kontaktoj kun Minskanoj
– „Brandenburgische Neueste Nachrichten“, Potsdam, NDPD, 13. 5. 77, Distrikta Renkontiĝo de Potsdamaj esperantistoj; 6. 8. 77, Rilatoj de Potsdamaj esperantistoj al ĝemelaj urboj; 14. 12. 77, Trigroŝa Romano en Esperanto

2.11. **Rostock**

– „Demokrat“, Rostock, 5./6. 2. 77, Parolado kun W. Plate, sekretario de subdistrikta laborgrupo Esperanto de distrikto Rostock
– „Norddeutsche Neueste Nachrichten“, Rostock, NDPD, 7. 7. 77, Esp.-lernantoj en la lernejo Karl Meseberg, Lütten-Klein; 13. 10. 77, novaj Esp.-kursoj; 2. 9. 77, De kiam ekzistas Esperanto kaj kiamaniere oni uzas ĝin en GDR?; 20. 10. 77, Fakterminologioj en Esperanto; 13. 12. 77, Trigroŝa Romano en Esperanto
– „Ostseezeitung“, Rostock, SED, 21. 8. 77, Laborgrupo Lumturo;
– „Ostseezeitung“, Stralsund, SED, 16. 6. 77, Esperantistoj korespondas kun Pölva/SU; 20. 8. 77, Laborgrupo Lumturo

2.12. **Schwerin**

– „Der Demokrat“, Schwerin, CDU, 14. 3. 77, Bona kunlaboro kun polaj esperantistoj; 18. 8. 77, nova Esperanto-kurso
– „Norddeutsche Zeitung“, Schwerin, NDPD, 3. 6. 77, Kunsido de CLE en Neubrandenburg
– „Schweriner Volkszeitung“, Schwerin, SED, 22. 9. 77, nova Esperanto-kurso

2.13 **Suhl**

– „Freies Wort“, Suhl, 15. 4. 77, Nova laborgrupo Esperanto en la Domo de Junaj Pioniroj, Hildburghausen; 13. 9. 77, Franca esperantisto Gilbert Gerrier en Oberhof

(Kunmetis R. Schonert)

Komento:

Krome oni devas aldoni 24 ampleksajn artikolojn el „Der Morgen“. Do sume pli ol 120 artikoloj, kiujn ni ricevis.

Mankas la distrikto Frankfurt/Oder, kiu ŝajne ne sukcesis ion aperigi. Verŝajne entute CLE nur nekomplete ricevis eltrančaĵojn. Ĉiukaze: la gazetara laboro ankoraŭ ne povas kontentigi.

Esperanto apartenas al la „Lingva situacio de GDR

En la konata revuo „Sprachpflege“ (Lingva Kulturo), revuo por bona germana lingvo, eldonata de VEB Bibliographisches Institut Leipzig, ni trovas en n-ro 1/78 (p. 1—6) interesan artikolon de d-ro Jürgen Scharnhorst (Centra Instituto por Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR) pri „La lingva situacio en Germana Demokratia Respubliko“.

En sia artikolo d-ro Scharnhorst karakterizas la ĝeneralan situacion de la germana kaj de fremdaj lingvoj (ties instruado kaj flegado) en GDR. Pritraktante la rolon de fremdaj lingvoj en GDR, li i. a. skribas: „Por la scienco la latina nun kiel antaŭe havas grandan, de iuj subtaksitan signifon. Valoras atentigi, ke same kiel en aliaj socialismaj landoj tiel ankaŭ en GDR kreskas la nombro de tiuj, kiuj lernadas Esperanton. La movado de la laboristaj esperantistoj jam dum la tempo de la Respubliko de Weimar (Vajmar) kontribuis al la evoluo de la germana soveta amikeco.“ (p. 6)

Tiu sobra kaj certe iom tro konciza mencio tamen estas simptoma por la fakto, ke la lingvistaro de GDR iom post iom altkutimiĝas al la fakto, ke Esperanto pli kaj pli apartenas al la „lingva situacio“ de GDR.

★

Materialoj pri IMEK

La Altlerneja Konsilantaro de la socialisma Asocio de Polaj Studentoj en la Medicina Akademio „Nikolao Koperniko“ Krakovo aperigis „Konferencajn Materialojn“ pri la Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco 1977 en Krakovo, Pollando.

La respektinda broŝuro, ampleksanta 94 paĝojn, enhavas i. a. prikonferencan raporton, mesaĝon de la Honora Prezidanto de UMEA, Prof. D-ro Shinoda el Japanio, al IMEK, resumojn pri la fakaj prelegoj kaj represon de propono al IMEK de nia kolego D-ro Jozefo Megyeri, laboranta en Popoldemokratia Respubliko Jemeno, koncerne la disvastigadon en la medicinista medio.

Ne nur por midicinistoj la represaĵoj de du prelegoj estas interesaj: tiu de kolego D-ro Josef Hradil, ČSSR, pri „Internacia lingvo en medicino“ kaj tiu de kolego D-ro Lajos Molnár, Hungario, pri „Eksperimentoj per esperantlingvaj represaĵo-petokartoj“; ambaŭ pritraktas la aplikadon de Esperanto por la komunikado kaj informado en la mondo de la medicino respektive scienco.

Aldone estas represitaj la statuto de Universala Medicina Esperanto-Asocio kaj raporto pri la jarkunveno de UMEA en la kadro de la UK en Rejkjaviko 1977.

La esperantista medicinista kolegaro sincere dankas pro la disponigo de la daŭre interesa materialo. Imponas, kion kreis studentoj!

D-ro Giso Brosche

Krucvorienigmo



Helpo: r = radiko. — **Ĉ.** Ou, OO. — **4.** Rio. — **6.** Obi/o/. — **8.** Sori. — **12.** Enid. — **13.** Tao. — **16.** ATV.

Horizontale: **A.** Koncernanta arton / laŭ maniero de ankro / grupo da sportistoj r — **B.** Finaĵo de pasiva voĉo prezenca / **la 1-a parto de la moto** / malongigo de Komunista Internacio — **C.** Maniero de vestado r / argileca farbo r / vivanta en aero / naĝbirdo r / percepti per okuloj r — **Ĉ.** Tranĉkapabla / teritorio sur insulo Honŝiu / pena agado / signo sur belgaj aeroplanoj / speco de fungetoj kiuj naskiĝas sur malseketaj neaerumataj objektoj — **D.** En tiu tempo okazinta / nedifinita kvanto da materio r / en alta grado / malkomfortigi iun r / komercaĵoj — **E.** Muzika teatraĵo / nomo de la 21a litero en la E-a alfabeto / azia greno r / movigi sin per kruroj r / malice grimaci r — **F. La 2-a (fina) parto de la moto** — **G.** Esprimado de pensoj per gestoj r / muzikinstrumento kun kordoj kaj klavaro.

Vertikale: **1.** Objekto de korinklino (sen o) — **2.** Japana metropolo — **3.** Sufikso por malbona eco / lana teksaĵo r — **4.** Hispane „rivero“ / rigidigaĵo por tolaĵo r — **5.** Peco da teksaĵo / nomo de soveta komponisto Ĥaĉaturjan — **6.** Enlasi aeron en la ĉambron (sen i) / japana virina zono r — **7.** Poŝo el malfajna ŝtofo r / bonodoro r — **8.** Apelacii r / suprenglisi en leviĝanta termika fluo — **9.** Kruela romia imperiestro / artifika ago r — **10.** Parto de birda korpo r / toraka osto r — **11.** Perforta forpreno / greka fablisto r — **12.** Urbeto en Oklahoma / cedi kambion al iu — **13.** Markolo en Tajlando / rilatanta skrapadon de kampo — **14.** Tirstango ĉe veturilo r / saltanta amfibiulo r — **15.** Mallonga literatura verko / sinsekvo da objektoj — **16.** Mallongigo de brita televida kompanio / ludo sur 64 kampoj — **17.** Nomo de la 17-a E-a litero / apartenanta al kunulo de virino — **18.** Japana vesto r — **19.** Gefiloj.

Adolf Staňura, ČSSR

Esperanto-kursoj en Popolaj Altlernejoj

- Nuntempe en GDR funkcias oficialaj Esperanto-kursoj en Popolaj Altlernoj de Berlin, Magdeburg, Schwerin, Leipzig, Aue kaj Templin.
- Ankaŭ en Güstrow, distrikto Schwerin, Esperanto nun estas instruata en popola altlernejo. Docento estas s-ro Buth, kiu gvidas kurson kun 35 partoprenantoj.
- Septembre 1977 en Schwerin ekzameniĝis ok kursanoj por la diplomo A. Letervespero aranĝita la 20an de junuaro 1978 rezultigis 36 poŝtaĵojn el 11 landoj, 15 skribintoj korespondemas. *Laŭ F. P. Kurtz*

Intensivkursus in Halle

In der Zeit vom 15. – 21. 10. 1978 findet in Halle ein Esperanto-Intensivkursus statt. Der Kursus wird von einem ausländischen Lehrer geleitet. Voraussetzung für die Teilnahme ist die Beendigung eines Grundkurses.

Die Kosten (Verpflegung, Übernachtung, Kursgebühren) werden je Teilnehmer 80 – 90 M betragen. Interessenten melden sich beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto.

III. Zentrales Treffen der Esperantisten im Kulturbund der DDR

Das III. Treffen der Esperantisten findet vom 13. – 15. Oktober 1978 in Rostock statt.

Hauptaufgabe des Treffens wird es sein, aus dem IX. Bundeskongreß des Kulturbundes Schlußfolgerungen für die Arbeit der Esperantisten zu ziehen und einen würdigen Beitrag zum 30. Jahrestag der Gründung der DDR zu leisten. Wie auch auf den zurückliegenden Treffen wird ein interessantes und vielseitiges Programm geboten, das die wichtigsten Seiten der politischen und fachlichen Arbeit der Esperantisten in der DDR berührt. An dem Treffen werden ausländische Delegationen teilnehmen. Über die Auswahl der Bezirksdelegationen entscheidet der jeweilige Bezirksarbeitskreis. Über die Teilnahmemöglichkeiten als Gäste informiert der Zentrale Arbeitskreis.

Junulara Renkontiĝo ĉe Dresden

La 7-an ĝis 9-an de aprilo ĉijare junuloj el la distrikto Dresden, el Pollando (Bydgoszcz) kaj ČSSR (Teplice, Cheb, Mělnik) rekontiĝis. Oni diskutinterŝanĝis spertojn, komune ekskursis en la ĉirkaŭon kaj elektis novan junularan komisionon, kies prezidantino fariĝis Marita Dörner el Meißen.

Elstaris la impresa gvidado de Otto Lauckner tra la iama koncentrejo Hohnstein. La gvidinto mem estas iama arestito. *(Laŭ N. Karbe)*

Prospekto pri Pirna

Al germanlingva prospekto pri la ĉe-elba saksa urbo Pirna estas aldonita kvarpaĝa esperantlingva klarigo.

Informojn donas Helmut Fuchs, 83 Pirna, Hohe Straße 33.

Laŭ peto de leganto:

Esperantisto el urbo Nezamyslice el ČSSR skribinta al Wieslaw Beyrowski (pk 37, 84-300 Lebork/Pollando) bv. reskribi kaj indiki la adreson.

Kontrakto

Tiu ĉi kontrakto pri amikecaj rilatoj kaj **kun**laboro estas subskribita inter la Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco en urbo Poltava (Ukraina Soveta Socialisma Respubliko) kaj la Esperantorondo Eisenach (Germana Demokratia Respubliko).

La kontrakto celas:

a) profundigi la amikecajn rilatojn inter niaj urboj Poltava kaj Eisenach
b) aktivigi la laboron en niaj urboj por stimuli la progreson de la internacia lingvo Esperanto
c) ebligi al niaj membroj interŝanĝi sperton pri la Esperanto-movado en niaj landoj kaj urboj pere de korespondado.

Por efektivigi ĉi tiujn celojn ni antaŭvidas:

a) interŝanĝi regule niajn laborplanojn, korespondaĵojn pri la laboro de niaj societoj kaj pri interesaj eventoj en ili;
b) interŝanĝi salutkartojn inter niaj societoj okaze de politikaj kaj kulturaj festotagoj:
por Poltava: la 1-a de junuaro, la 8-a de marto, la 1-a de majo, la 9-a de majo, la 7-a de oktobro (la tago de konstitucio), la 7-a de novembro, la 15-a de decembro;
por Eisenach la 1-a de januaro, la 8-a de marto, la 1-a de majo, la 8-a de majo, la 7-a de oktobro, la 15-a de decembro;
c) interŝanĝi E-gazetojn kaj E-literaturon, kiuj aperos en niaj landoj;
ĉ) interŝanĝi fotojn kaj aliajn aĵojn pri gravaj aranĝoj kaj eventoj en la vivo de niaj societoj;
d) aranĝi ĉiujare klubvesperojn pri niaj urboj kaj landoj;
e) propagandi la E-ideojn inter la civitanoj de ambaŭ urboj kaj varbi novajn adeptojn de Esperanto.

Tiu ĉi kontrakto estas subskribita por du jaroj kaj validas ekde la 1-a de majo 1978.

En la nomo de Poltava E-Klubo de Internacia Amikeco	En la nomo de Esperantorondo Eisenach en Kulturligo de GDR
Vasilij Grigorenko u. Poltava, la 20-a de marto 1978	Ruth Partecke u. Eisenach, la 12-a de aprilo 1978

★

Diskutmaterialo de HEA

Hungara Esperanto-Asocio, kiu tre multflanke kaj altkvalite agadas, komencas eldoni serion de diskutmaterialo sub la temo „Kion scii por organizi nian movadon“?

Tiu materialo, esperantlingva kaj ankaŭ hungara, havas la celon stimuli la diskuton en la hungaraj grupoj pri celoj kaj agadformoj de la Esperanto-movado. Surbaze de la kolektita el tiuj diskutoj materialo oni ellaboros Gvidlibron pri la movado.

Aperis la unua kajero de la diskutmaterialo „Kial kaj kiel partopreni en la movado?“ de János Patan.

Esperanta ŝako

Nova titolpaĝo de ESPERANTA ŜAKO. — La revuo de „Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI), ESPERANTA ŜAKO, montras novan aspekton ek de la numero 1/1977. — ESPERANTA ŜAKO ĉefe raportas pri koresponda ŝako; la numero 1/77 enhavas novaĵojn el Esperanta ŝakujo, turnir-raportojn kaj liston kun nomoj de la 2. Teamturniro, en kiu partoprenas 21 teamoj el 14 landoj, ili estas envicigitaj en tri grupojn. Sekvas interesaj partioj de EŜLI-anoj kaj grandmajstro, komunikoj el la agado de la nov-fondita „Esperanta Ŝak-Grupo Hungara". Tabelo indikas la situacion je la 1. 1. 77 pri la 30 plej bonaj ludantoj de EŜLI en ilia rangordo; la Regularoj de Korespondŝako kaj ŝakportreto de la grandmajstro Rubin-stein faras EŜ 1/77 grava kaj vigla. La lastan paĝon ornamas diagramoj de ŝakproblemoj.

Alfred Knapp, Domagkstr. 7, DDR - 5302 Bad Berka,
peranto de EŜLI por GDR

Ni kondolencas:

- Forpasis la 19an de marto 1978 en Karl-Marx-Stadt Paul Ullmann (1895 — 1978), iam laborista esperantisto.
- Forpasis la 15an de marto 1978 la latva esperantisto Josef Gold el Riga, kiu regule kunlaboris kun Centra Laborrondo.
- Forpasis post pli longa malsano nia ŝatata grupestro Fritz Schmalz el Zittau-Pethau la 26an de oktobro 1977.

Distrikto Dresdeno
Subdistrikto Laborrondo „Trilandangulo" Zittau

Ni gratulas:

Sian 70an naskiĝtagon festis la 22an de majo 1978 la konata senlace aktiva esperantisto el Dresden Erich Seidemann. (Ni erare jam festis lian 75an en „de" 2/78 kaj petas pardonon.)

El letero de Hans Diedrich

„. . . laŭ mia opinio la publika laboro de niaj rondoj estas la plej grava tasko. Ni devas uzi ĉiujn eblecojn kaj koncentrite labori por fondi novajn kursojn . . . Kiu surpaŝas novajn vojojn? Ni tre volonte lernas el aliaj spertoj kaj petas informon.

(Hans Diedrich, estro de Distrikta Laborrondo Esperanto, 27 Schwerin, Von Thümenstr. 42)

Puno kun gajno

Dum profesia vojaĝo en Svedio amerikano en Stockholm aĉetis uzitan aŭtomobilon por 1200 kronoj. Kiam li forvojaĝis hejmen li simple post-lasis la veturilon en la haveno. Du monatojn poste li ricevis skribaĵon de la sveda polico: „Por forigi la trafikan barilon ni vendis vian aŭto-mobilon por plej alta oferto. Minus la leĝa punmono ni transsendos al vi 1490 kronojn."

Bulgario

Lernantino, 15j., dez. kor., kol. bk, esperantaĵojn: Katja Geneva Ĵaljazkova, str. „Lozenec“ 9, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 15j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ĵivka Petrova Ivanova, str. „Buzluĝa“ 4, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 24j., dez. kor. pri turismo, sporto: Angel Kostadinov Janakiev, **6280 Gâlâbovo,** blok 7 B, vh. 5, ap. 5

Instruisto, 44j., dez. kor. p. ĉ. t.: Goĉo Mitev Koev, str. „Vazrajdane“ 14, **6280 Gâlâbovo**

Oficistino, 31j., dez. kor. p. ĉ. t.: Marija Jankova Deĉeva, blok 14, vh. B ap. 6, **6280 Gâlâbovo**

Flegistino, 42j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ivanka Ivanova Gajdarova, str. „Al. Stambolijski“ 37, vh. A, ap. 4, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto; 26j., dez. kor. p. ĉ. t.: Slavi Minkov Bekjarov, **6290 Obruĉište,** distr. St. Zagora

Teknikisto, 31j., dez. kor. p. ĉ. t.: Dimo Tenev Dimov, bl. 17, vh. A, ap. 2, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 37j., dez. kor. p. ĉ. t.: Dimo Bojkov Georgiev, str. „Čatalĝa“ 9, **6280 Gâlâbovo**

Librovendistino, 28j., dez. kor. p. ĉ. t.: Stanka Ivanova Draganĝikova, bl. 16, vh. A, ap. 1, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 14j., dez. kor. p. ĉ. t.: Petja Ivanova Čakârova, str. „St. Planina“ 14, **6280 Gâlâbovo**

Lernanto, 12j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ĵeljazko Tilev Stojanov, str. „Tumba“ 8, **6280 Gâlâbovo**

Lernanto, 13j., dez. kor. p. ĉ. t. Ivan Iliev Jonovski, str. „Čatalĝa“ 6, **6280 Gâlâbovo**

Lernanto, 13j., dez. kor. p. ĉ. t.: Donĉo Georgiev Akov, str. „G. Dimitrov“ 67, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 12j., dez. kor. p. ĉ. t.: Vanja Petkova Georgieva, str. „Vârbica“ 12, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 12j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ĵaneta Ĵeleva Ĵeleva, str. „8i mart“ 1, **6280 Gâlâbovo**

Lernanto, 12j., dez. kor. p. ĉ. t.: Kanjo Dimitrov Kanev, str. „Aheloj“ 5, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 16j., dez. kor. p. ĉ. t.: Radostinka Ivanova Kajrjakova, str. „Stranĝa“ 5, **6280 Gâlâbovo**

Horloĝisto, dez. kor. p. ĉ. t.: Diko Tonev Dikov, bl. 18, vh. A, ap. 4, **6280 Gâlâbovo**

Librovendisto, 58j., dez. kor. p. ĉ. t.: Boris Kostov Penev, str. „G. Dimitrov“ 19, **6280 Gâlâbovo**

Teknikistino, 21j., dez. kor. p. ĉ. t.: Tinka Tileva Pavlova, str. „Plamâk“ 7, **6280 Gâlâbovo**

Lernantino, 14j., dez. kor. p. ĉ. t.: Hristinka Dinĉeva Dinĉeva, bl. 10 B, ap. 4, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 36j., dez. kor. p. ĉ. t.: Kiro Ĵeljazkov Goĉev, bl. 18, vh. A, ap. 7, **6280 Gâlâbovo**

Rumen Raev Dimitrov, **1504 Sofio,** Dimiter Poljanov str. 1, 30j. dez. kor. k. germanaj fraŭlinoj

Infanĝardenistinoj dez. kor.: Elena Geŝova **7300 Kubrat,** str. Gagarin 34

Julia Borisova, **7300 Kubrat,** str. Kirkov 32 (26 k. 25j.)

Div. geesperantistoj de Esperanto-societo „Leono“, **4468 Momina Klisura,** okrag. Pazardzik, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

GDR

20 geesperantistoj el Güstrow, finante komencantan kurson, 22—60j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., bv. skribi al la estro de la Subdistrikta Laborrondo Esperanto: Hans Buth, **26 Güstrow,** Prahmstr. 19

Junulo, 17j., dez. kor. k. junulino pri matematiko, kol. pm, bk: Thomas Dittrich, **923 Brand,** Zugspitze 8

D-ro inĝ. Wolfgang Müller, **20 Neubrandenburg,** Petrosavodsker Str. 62, 45j., dez. kor. k. samaĝulo p. ĉ. t.

Karl Felkel,**2082 Feldberg,** Haus am See, 44j., dez kor. pri ŝako, fiŝkaptado k. aliaj t., tutmonde

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 497